5 Julio 1906. DUA JARO N° 11 (29)

LA ALĜERIA STELO

OFICIALA ORGANO

De la Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

ALGER

APERÇU HISTORIQUE

Jamais cité n'eut autant de maîtres successifs, de conquérants divers qu'en a eus « Alger la-Blanche ».

Vous connaissez la légende : on raconte qu'Hercule, après avoir franchi les colonnes qui portent son nom (alias détroit de Gibraltar), fatigué de l'effort peu commun qu'il venait de faire et éprouvant le besoin de prendre un repos bien gagné, avisa, au pied d'une montagne, un endroit délicieux, un site ravissant et se décida à y établir ses pénates avec ses onze compagnons de route. -- Une ville fut bientôt construite, mais, quand Hercule voulut continuer sa route, ses compagnons, captivés par le charme de ce séjour enchanteur, refusèrent de l'accompagner et, à la cité qu'ils avaient ainsi édifiée, ils donnèrent, pour ne pas faire de jaloux, le nom d'Icosium (onze). Ainsi se trouvèrent posées les premières fondations de la future Alger.

Lorsque les Arabes envahirent l'Afrique, la peuplade berbère de Beni-Mezrana s'était établie à Icosium. Mais bientôt la ville fut occupée par les Almohades (1146), auxquels succédèrent, en 1185, les Almoravides, et en 1285, les Hafsides.

En 1505, les Espagnols s'emparèrent d'Alger qu'ils fortifièrent. Le comte de Navarre y fit construire la forteresse du Penon. En 1515, un corsaire fameux, Baba-Aroudj, chassa les Espagnols et devint le grand chef de la contrée qui s'étend de Cherchell à Alger. A partir de cette époque, les pirates occupèrent la cité.

Mais Baba-Aroudj fut lui-même remplacé par Kheïr-ed-Din, qui fut nommé pacha par le sultan. De 1518 à 1530, les pachas, suzerains du sultan, se succèdent sans interruption.

Enfin, en 1711, et jusqu'à 1830, les Deys d'Alger, chefs suprêmes du pays, règnent sur la région.

Le dernier de ces souverains, Hussein, irrité des justes reproches que lui faisait le Consul de France, M. Deval, frappa notre représentant d'un coup d'éventail au visage. Ce fut l'étincelle qui mit le feu aux poudres. Le 14 juin 1830, nos troupes débarquaient à Sidi-Ferruch, et, 21 jours après, le 5 juillet, le pavillon français flottait sur El-Djezaïr.

Occupée par les Romains, par les Barbares, par les Espagnols, par les Maures, par les Turcs et enfin par les Français, Alger a conservé des vestiges du passage de ces peuples divers et dans toutes les descriptions qui en ont été faites, on retrouve, dans la cité moderne, des traces de ces conquérants nombreux aux mains desquels la ville est passée.



Michel Vieuchange

KALANUŜA

(*Antikva legendo*)

Originale esperantigis D. V. SPERANSKIJ

(Daŭrigo)

Unu post la alia, faladas ĉe liaj piedoj potencaj regnoj, falas fortikaĵoj ; sed li ne verŝas vane sangon, kaj ĉiuj venkitoj fariĝas liaj kunliganoj kaj amikoj. Kiu do povas esti tiu potenculo ? Certe li estas la bonfaranta Viŝnu, korpiĝinta kiel nova Rama'o por ke li malaltigu la fierulojn kaj altigu la humilojn.

Kaj jen al li rapidas Kalanuŝa, brulante per pasia dezirego ekvidi la efektivigon de sia ravo, fali je la piedoj de tiu viva Dio, tielsame kiel antaŭe li jam falis je l' piedoj de malviva idolo.

III

La supraĵoj de l' malproksimaj montoj helas per purpura brilo, sed ankoraŭ en densa malhelo dronas la tendaro. Apogantaj kontraŭ iliaj ŝildoj multepezaj, levantaj teruran arbaron de longaj pikoj, staras infanterianoj kiel nerompebla muro. Rajdistoj, brilaj per iliaj arĝentaj ŝildoj, staras kontraŭe, kaj ruĝaj plumaĵoj, kvazaŭ flamaj langoj, balanciĝas super iliaj kaskoj. Kaj apenaŭ la unuaj radioj de l' ĉielruĝo kaj de l' rapide ekleviĝanta post ĝi suno penetras en la tendaron, blindige ekflamiĝas la kirasoj oraj de l' reĝa gvardistaro, kiu, kun tubaj sonoj, aliras per sia mezura paŝado antaŭ sia granda potenculo.

Blindigita, frapita anime per tiu brilado, premigita per la konscio de teruriga forteco, timeme staras ermito, apoganta konraŭ palma trunko, ne kuraĝanta antaŭeniri. Li, antaŭ ne longe tremigis la homojn : nun li mem timas, atendanta la aperon de sia korpiĝinta Dio. Surdiga bruego devigas lin ektremi per lia tuta korpo ; poste ektondras kriego kiu disvastiĝas, ripetita per senfinaj eĥoj. La militistoj frapas iliajn ŝildojn per pikoj kaj glavoj. Spirante kaj skuante sian mirindan kapon, saltas potenca, rapidega ĉevalo, kaj sur ĝi, hele brilanta per siaj luksegaj kiraso kaj armiloj, flugas alta kaj gracia junulo. Per sia forta mano hal-

tiginte la ĉevalon, li malrapide ĉirkaŭrajdas laŭ la vicoj de sia militistaro. Per netolereblaj briloj flamas liaj fieraj okuloj ; sur liaj purpuraj lipoj estas duonfavora, duonmoka rideto. Kalanuŝa'o, en sia ravo etendas siajn brakojn vidanta la vivan korpiĝon de la sankta figuro kiu vizitadis lin en liaj ravoj kaj songoj. Jen estas li — antaŭ longege atendita senkulpulo.

IV

Lacigita per la longa observado de l' manovroj de sia militistaro, la juna potenculo kuŝas sur tapiŝon en sia tendo. Junaj knaboj svingas super li per ventumiloj faritaj el strutaj plumoj : sonas melodiaj harpoj kaj liroj. Severaj batalemaj militestroj staras ĉirkaŭe ; juna militisto sidas apud la reĝo. Rapide kuras vinportistoj, disdonantaj pokalojn plenitajn. Sed la imperiestro estas laca, li volas ripozi : nek vino, nek muziko, nek parolado amika amuzas lin. Li jam estas preta svingi per sia mano, forsendi ĉiujn kaj ekdormi. Sed subite eniras unu el liaj kortegulo̧j, kiu salutas humile kaj anoncas kun flatema rideto, kvazaŭ li antaŭe pardonpetas :

— Dia potenculo ! Tie. ia nuda filozofo petegas ke oni permesu lin ekvidi ciajn helajn okulojn. Li alıris el malproksime, kaj de frumateno postulas tiun grandegan feliĉon...

Favora rideto vivigas la lacan vizaĝon de l' reĝo.

— Nuda filozofo ? Tio estas tre amuzinda ! Voku lin tien ĉi ! Kion li diros al ni ?

Kalanuŝa eniras kaj longatempe staradas, ensorĉigata per la vido de tiu fortega kaj graciega belulo, simila je Krišna, ripozanta meze de amaso da kortegulo̧j. La imperiestro ne komprenante, rigardas la strangan figuron de tiu nuda, seka kiel mumo, homo, kaj li ordonas alvoki tradukiston. Bruna Hinduso, humile fleksinta siajn genuojn, tradonas la reĝan demandon.

— Kion deziras ci ?

— Montru ci al mi, al cia fidela sklavo, komencas Kalanuŝa iom ekkuraĝanta, la celon de cia alveno kaj fortiku ci mian kredon ke ci estas Tiun kiun la mondo atendadis de centoj da centjaroj.

— Mi ĝojas ke vi atendas min, respondas la reĝo ; mi volas esperi ke ankaŭ vi ricevos min bone.

— Sed per kia nomo ci volis aperi tie-ĉi ? sufokiĝanta per malkvieteco, demandas kalanuŝa.

— Mi estas Aleksandro, diras la reĝo, skuante siajn ŝultrojn...

(Daŭrigota.)

DIVERSAĴOJ

TUTMONDAJ FAJROKUTIMOJ.

Kolekto farita de H. W. Southcombe pri la kutimo aŭ ceremonioj en kiuj oni ekbruligas fajron aŭ grandajn ekstermondajn fajrojn de ligna̱jo, aŭ kandelojn, torĉojn, artefajra̱jojn, aŭ kiam oni pafadas per pafiloj. Oni tie povas legi sciigojn pri 28 nacioj senditajn de 34 esperantistoj. — Tiu interesa verketo kostas 35 centimojn. Sin turni al la Brita Esperantista Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo en reliefpunktoj por blinduloj. — 3 fr. jare por ĉiu lando. — Direktoro Th. Cait, 12, rue Soufflot, Paris. — Tria jaro. — N-ro 5, Majo 1906. — ENHAVO : 1. Kroniketo (Fanny Ducret), Th. C ; Interparolado : Vizito ; Problemo ; Humora̱jo ; Ŝirmbastonoj, Th. Cart ; Poezio : el Heine ; Korespondado, Brown ; Miksa̱jo : Nombro de loĝantoj ; Proverboj ; Felietono : Perdita kaj retrovita, Boirac.

KIO POVAS OKAZI, SE ONI DONACAS SURPRIZE.

Tiu sprita̱jo de Fritz Reuter, tradukita el la subgermana dialekto de E. Ĉefeĉ, estas traduko el lingva̱jo ne konata krom en malgranda parto de Germanujo kaj la teksto estas neniam antaŭe tradukita en ian modernan lingvon. La kompreniĝo de la historio estas simpligita kaj faciligita per 16 beletaj ilustra̱joj.

La libro sin rekomendas por komunaj legadoj en esperantaj kursoj kaj por esti donace fordonata, kun enmetita ŝlosilo, al neesperantistoj kaj personoj, kiuj malfavore konsideras la novan lingvon aŭ por esti demetata en la legoĉambroj de hoteloj kaj restoracioj.

La prezoj estas : Unu ekzemplero (presita sur arta papero), 70 centimoj ; Dek ekzempleroj (propaganda eldono sur malpli dika papero), 5 frankoj. — Oni sin turnu al S-ro E. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Road, Streatham, London, S. W. — Poŝtmarkoj el ĉiuj landoj estas akceptataj laŭ sia efektiva valoro.

ANATOMIA VORTARO.

« Anatomia Vortaro », kvarlingve eldonita de la firmo Hachette kaj Ko , Paris, (latine (Basel'a nomenklaturo), france, angle kaj esperante). Tiu verko estas tre utila ne nur por tiuj okupantaj

sin pri medicino, sed por ĉiuj esperantistoj, kiuj trovos en ĝi vortojn ĝis nun netroveblajn en niaj ordinaraj vortaroj.

Tutkorajn gratulojn al la fervoraj samideanoj de la Medicina Grupo.

KVARVOĈAJ KANTOJ.

La Londona Brita Esperantista Asocio eldonis broŝureton enhavantan 6 kvarvoĉajn kantojn, eltiritajn el la Fundamenta Krestomatio.

Ni gratulas la B. E. S. pro ĝia bonega ideo eldoni tiujn kantojn, kies titoloj estas: « Anĝelo », « Kanto de l' Ligo », « La Malliberulo », « Al la Reĝo », « Sonoriloj de vespero », « La Espero ». La kosto de tiu broŝureto estas o fr. 60, sed la unuaj ekzempleroj menditaj kostos nur o fr. 30.

Oni sin turnu al la Brita Esperantista Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London.

PETO PRI KORESPONDADO.

S-ro H. Rendahl, studanto, Landskausliet Jonkoping (Svedujo), deziras korespondadi kun junaj alĝeraj geesperantistoj pri natursciencoj.

KELKAJ TROJANAJ KUTIMOJ AŬ SUPERSTIĈOJ.

(Fino)

7. Oni kredas, ke en printempo, kiam iu vidas sur kampo, je paŝto, blankan ŝafidon, tiu ĉi, de tiam, komencas grade blankiĝi, kaj vidinto nigriĝi.

8. Je 23 aprilo, ĉiujare, oni nepre pezigas sian korpon kaj netolereme atendas saman daton de la venonta jaro por konstati plipeziĝon.

9. Kiam, printempe, unuafoje ekfulmotondras, malkleruloj frapas sian kapon per peco da fero, por ke la kapo estu sana, kiel fero!

P. Stojev, Trojan.

PRI CINDRULINO.

Nia bonega angla korespondantino, F-ino E. J. Catt, sciigas nin, ke laŭ la angla eldono, la pantofloj de Cindrulino vere estis el vitro. Sendube de l' antikva fleksebla speco — kies fabrikarto de longe estas perdita.

GERMANLINGVA ESPERANTISTA SOCIETO (G. E. S.)

La 2-an de majo, fondiĝis en Brunsvigo la G. E. S., enhavonta ĉiujn, kies gepatra lingvo estas la germana. Ekster la multenombraj anoj de la Brunsviga Grupo, kiu aranĝis la kongreson tiel sukcesplene kiel ofereme, ĉeestis reprezentantoj de la grupoj : Berlin, Braunschweig, Breslau, Brunn, Elbing, Frankfurt a-M, Frankfurta Laborista Grupo, Goppingon, Halle a-S, Hamburg, Hanau, Neu-Jsenburg, Prag, Schoneberg, Stuttgart, Ulm, Ung, Hradisch, Wien, Wiesbaden, kaj ili fondis unuiĝon registrotan (E. V.), nomatan « Germanlingva Esperantista Societo » (G. E. S.).

La ĉefa tasko de la Societo estas la disvastigado de Esperanto tra la scienco kaj tra la komerco, precipe en la germanlingvaj landoj : Germanujo, Aŭstruj, ankaŭ Svisujo.

La jarkotizaĵo estis fiksata je 3 markoj, entenate la senkosta livero de l' oficiala organo « Germana Esperantisto ».

Kiel estraro, estis elektitaj :

Honora Prezidanto : D-ro L. Zamenhof ;

I-a Prezidanto : D-ro E. Mybs, Marktstr., 68 ;

II-a Prezidanto kaj Sekretario : D-ro J. Hanauer, Frankfurt a-M, Bleischstr.. 5.

Kasisto : Fr. Schuck, Braunschweig, Thomaestr., 16.

La adreso de oficejo estas : Altona, Marktstrasse, 68.

NOVA SIGNO ESPERANTISTA.

La Frankfurta Esperantista Grupo proponas al la samideanoj simplan kaj malgrandan insignon, kies enkonduko estus tre malmultekosta kaj ankaŭ sukcesplena.

La insigno estas pinglo kun verda emajla kapeto. Ĝi estos fiksata en la dekstra angulo de la vestkolumo, bone videble kaj tamen ne trudema.

La Centra Oficejo kaj D-ro Zamenhof aprobis tiun insignon.

La samideanoj, pro diversaj kaŭzoj, ne ĉiam kaj ĉie surmetas la verdan stelon ; ofte esperantistoj estas najbaroj en vojaĝo, kafejo, restoracio, k. t p , ne ekkonante unu la alian reciproke. Ili do ne povas paroladi kune esperante kaj tiel fari la plej bonan propagandon por nia afero. La Frankfurta Grupo ne intencas kontraŭbatali la verdan stelon ; kontraŭe. Ĝi nur proponas duan signon pli simplan. La verda pinglo modesta kaj sekve malmultekosta, kiun ĉia esperantisto senescepte povas aĉeti, povas paradi sur ĉiuj vestoj.

La prezo estas po 50 pingloj 20 pfenigoj ; po 100 pingloj 35 pfenigoj. La sendkostoj estas internacie 10 pfenigoj.

Oni direktu la mendojn al Esperantista Grupo, Frankfurto je l' nomo de S-ro C. Barthel, oehlerstr. 14.

INTERNACIA KOMERCISTA ESPERANTA SOCIETO

La 8an de majo fondiĝis en Frankfurto a-M la Internaci komercista societo esperanta « Progreso ».

Per fondo de filioj en ĉiuj urboj de la tuta mondo, la nova societo celadas propagandi Esperanton speciale en la komercistaro. La estraro konsistas el Carl Feyerabend (prezidanto), Stefan Wolf (kasisto); plie estis elektitaj en la estraro : Carl Barthel, Max Eisenkramer, H. Docters, Heinrich Haas, Adolf Hirsch, Ludwig Katz, Carl Kirchhoff, Carl Küchler, Max Ruhstadt. Kotizajo por firmoj almenaŭ M. 10.-, por komercaj oficistoj M. 1.- jare. Filio povas esti fondata, se almenaŭ 20 membroj de la societo logas en la sama urbo. La filioj estas rajtigitaj, reteni 50 o/o de la kotizajoj. La resto estas sendota al la Centrejo Frankfurt a-M., por pagi la kostojn de la societa gazeto « Internacia Komerca Revuo », kaj por la ĝenerala propagando de la tuta Societo.

Konsiderante la gravecon de tiu ĉi entrepreno, ĉiuj komercistoj de la tuta mondo estas petataj TUJ ALIĜI al la Societo. Detala regularo senpage. Adreso : « Progreso », Internacia Komercista Esperanta Societo, Frankfurt a-M., Neue Mainzerstrasse, 59 ; monsendajoj al la kasisto, S-ro Stefan Wolf, Frankfurt a-M., i. H. Darmstadter Bank.

« Komercistoj de la tuta mondo, organizu vin, por enkonduki Esperanton kiel komerca lingvo ! ! ! »

A VENDRE APPAREIL PHOTOGRAPHIQUE 9 × 12, LE MULTICOLORE, avec tous ses accessoires, pied, cuvettes, lanterne, etc., à l'état de neuf ; permet de faire la photographie des couleurs. L'appareil a coûté 120 francs. On le laisserait pour 70 fr. — S'adresser à l'imprimerie de « La Algeria Stelo » 57, rue d'Isly, Alger.

☛ **L'Imprimerie TORRENT, 57, rue d'Isly, Alger,** livre aux Espérantistes de superbes cartes de visite, portant, sur le coin gauche (impression verte), le mot « Esperanto » au-dessus de l'étoile espérantiste. Le prix est de 3 francs le 100 (0,25 en sus pour envoi postal). Le numéro d'ordre, imprimé en noir, peut être ajouté au-dessous de l'étoile.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly

Lettres accent. de la Maison TURLOT, CHAIX et C^ie^, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo